

Tagiĝo

N-ro 40	Bulteno de Esperanto-Junularo en regiono Ostrava, Ĉeĥoslovakio. - Redaktas: Inĝ. Jan Werner, OSTRAVA-Kunčice, Na Lachu 6	JULIO 1958
------------	--	---------------

Esperanto-kursoj en regiono Ostrava.
Aŭtuno 1957 – printempo 1958.

La ĉefa tasko de la regiona konferenco en Odry la 25 Majo 1958 estis pritaksi la kursojn en la lasta sezono. Kolektita statistika materialo ebligis interesan superrigardon. Estis farita ankaŭ analizo de eksteraj kaj internaj malhelpoj, kiuj baras al pli sukcesaj rezultoj. Laŭspertaj sugestoj fontis el samtema konferenco en Olomouc la 10 Januaro 1954, el la raporto pri maniero de etika instruado de Esperanto traktita en la V-a kunveno de la italaj Esperanto-grupestroj en Bolonjo (vidu Tagiĝon 38) kaj el spertoj de ĉeestantaj kursgvidantoj.

Unue sekvu iom da statistiko:

A-kursoj: entute efektiviĝis 28 kursoj kun 434 kursanoj meznombro 15,5 en unu kurso. La kursojn finfrequentis 280 aliĝintoj, meznombro en unu kurso 10,0. Procenta rezulto estas 64,5 %.

En 27 kursoj estis uzata la lernolibro de Kilian, en unu de Krajíc.

Plej sukcesaj estis lernejoj kursoj:

1. Havířov, ministra lernejo – komencis 29, finis 29.
2. Havířov, ministra lernejo – komencis 26, finis 26.
3. Jakartovice, popola lernejo – komencis 10, finis 1
4. Vratimov, SUŠ – komencis 37, finis 25.

Pluaj kursoj okazis en (interkrampe nombro de aliĝintoj kaj finfrequentintoj; ĉe kursoj, kiuj daŭras, la malkresko estas nur supozata):

5. Ostrava – tramistoj (10-8), 6. Ostrava–Zábřeh, mezlernejo (10-6), 7.– 8. Poruba (12-6, 6-4), 9. Ostrava–Michálkovice (25-15), 10. Ostrava–Hulváky (6-6), 11.– 14. Ostrava–Vítkovice VŽKG (21-9, 17-12, 15-15, 14-10), B5. Budišov n/Bud. (6-2), 16. Karviná (8-4), 17. Kopřivnice (20-14), 18. Příbor (12-10), 19. Příbor, mezlernejo (12–neanoncite), 20.– 21. Frýdlant n/O. (22-11, 2-2), 22. Havířov (15-2) 23. Návsí (6-3), 24. Opava –(13-7), 25. Dolní Bludovice (20–neanoncite), 26.– 27. Odry (40-6, 12-10), 28. Třinec

Estis farita ankaŭ la komparo de aŭtunaj (18 – inkluzive de la tutjaraj) kaj printempaj kursoj (10). En tiu komparo debutas la kursoj printempaj 76% : 55%. Ŝajnas, ke la rezultoj en pluraj kazoj anoncitaj nur laŭ supozo ne estas realaj, kaj ke ankaŭ la printempaj kursoj proksimiĝas per sia rezulto al la malfavora cifero 55 %.

B-kursoj. La perfektigaj kaj pli superaj kursoj estas aranĝataj tre sporade, kvankam devo de ĉiu grupo estas zorgi ankaŭ pri tiuj nematuruloj, kiuj finis la elementan kurson. Ni ĉiam miras, ke tiom da kursanoj estas ĉiujare nov-bakataj, kaj ke tiom malplenas niaj kunvenejoj. Estonte ĉie aranĝu la perfektigan kurson! Aŭtune ni enketos sorton de la nunaj frequentintoj de A-kursoj!

En la sezono pasinta en la regiono Ostrava estis aranĝitaj nur 5 B-kursoj: 1.– 2. en Ostrava–Vítkovice VŽKT; (12, 11), 3. Ostrava–Hulváky (15), 4. Poruba (14) kaj 5. Třinec (12). Interesa kaj ĝojiga fakto estas, ke el 64 aliĝintoj 59 samideanoj finis la kursojn. Tio pruvas, ke la studadon daŭrigas nur tiuj, kiuj volas okupi sin pri Esperanto serioze.

C-kursoj. Entute okazis 3 konversaciaj kursoj: 1. Ostrava–Vítkovice VŽKG (12), 2. Frýdlant n/O. (11), 3. Třinec (8). Aliĝis 31 kaj finis 31.

Per la enketo estis ankaŭ kolektitaj diversaj plendoj pri malhelpoj, ekz.: mallernemo de kursanoj, malŝato de organizita agado (precipe ĉe junularo), troa okupiteco, iom post ioma seninteresiĝo, manko de bona volo k.a. Infanoj 10 – 14. jaraj soifas pri korespondado, sed serioze

lerni Esperanton ili laŭeble evitas. Kurson iam malsukcesigas instruisto neperfekta aŭ sen instrualento, ŝanĝado de labor- alternoj, manko de vortaroj kaj lernolibroj, speciale porinfanaj.

La sugestoj el la ĉefa referato, diskuto kaj la konferenco en Olomouc (vidu Tagiĝon n-ro 14):

1. Kursoj daŭru pli longe, 3 monatoj ne sufiĉas.
2. Instruisto zorge preparu ĉiun lecionon hejme.
3. Ĉiu leciono estu varia, estu interesa kaj amuza, ĉar la kursanoj vespere jam estas lacaj de laboro (kantoj, aktualaĵoj el E-movado, instrubildoj k.a.).
4. Ĉiuj lernantoj posedu lernolibron, por ke ili povu lerni hejme. En la kurso uzu lernolibron minimume, praktiku lernadon precipe per aŭdo-senso.
5. Rekomendata estas la rekta metodo, la nacilingvon uzu nur por ekspliki gramatikaĵojn k.s. Alie instruisto kaj ankaŭ kursanoj uzu Esperanton konsekvence dum tuta leciono.
6. Laŭeble parolu ĉefe la lernantoj. Instruisto nur direktu parolon, ekspliku, demandu, korektu, sed samtempe akcentu, ke "per eraroj oni lernas"!
7. Ĥora respondado utilas precipe en la unuaj lecionoj, kiam lernantoj ankoraŭ ne konas sin reciproke kaj iuj sentas embarason.
8. En elementaj kursoj ne traduku nacilingvajn tekstojn! Necesas, ke la kursanoj ekposedu kiel eble plej baldaŭ esperantlingvan senton, por ke ili parolu kaj komprenu sen enpena tradukado. En la perfektigaj kursoj, kie oni fajlas konon de la gramatikaj reguloj, tie bone servos tradukoj de naciaj tekstoj. Tamen eĉ tie ni enfazu precipe la konversacion.
9. Se instruisto elektas ian paroltemon ekster la lernolibro, elektu ĉiam temon el praktika vivo, por ke la kursanoj ne lernu jam komence vortojn ne tro bezonatajn.
10. Instruisto estu afabla konsilanto al ĉiu lernanto. Ekkonu ĉiun lernanton aparte, lian karakteron, kutimojn kaj traktu lin laŭ ili.

J. Werner

V. I. LENIN kaj ESPERANTO.

Ĝis nun ni sciis, ke k-do Lenin favoris Esperanton kaj ke li nomis ĝin latino de la proletaro, kiel en la jaro 1920 diris D-ro Hillerson, ĉefo de Soveta Misio en Praha kaj intima amiko de k-do Lenin, al prof. Miloš Lukáš, kiu lin intervjuis.

En junia n-ro de "INFORMILO Haná-Jeseníky" estae publikigita en ĉeĥlingva traduko parto de la artikolo "Vizite ĉe maljuna esperantisto Inte Ĉaĉe", ĉerpita de Jan Polzer el soveta ĵurnalo "Golos Rigi" (Voĉo de Rigo), organo de Riga urba komitato de Komunista partio en Litova SSR kaj de Riga urba komitato de la deputitoj el la tago 19.3.1958. La artikolo informas pri la prelego de k-do Inte Ĉaĉe en la Domo de Sciencoj de M. Gorkij en Leningrado:

"Inte Ĉaĉe dividis sin kun siaj aŭskultantoj pri la rememoroj je sia renkontiĝo kun V. I. Lenin, kiu lin 13.4.1918 invitis kune kun prezidanto de la societo Esperanto, prof. N. V. Devjatnin, al "Smolný". La renkontiĝo ĉeestis ankaŭ la popola komisaro por klerigo A. V. Lunaĉarskij kaj la persona sekretario de Lenin E. K. Drezen (estinta prezidanto de Espero).

Li rememoras, kiel entuziasme Lenin rakontis. Kiam en sia junaĝo li estis elmigrinta, li ellernis Esperanton laŭ franca lernolibro. En la II-a kongreso de Internacio en Bruselo (18 Junio 1914) prelegis Lenin france kaj Esperante.

Lenin proponis, ke estu kunvokita kongreso de esperantistoj, kiu ankaŭ okazis ekde la 1-a ĝis la 5-a de junio 1921. Ĉeestis ĝin 321 delegitoj (unu reprezentanto por 300 oficialaj membroj do por 96.300 membroj). La lasta renkontiĝo de Inte Ĉaĉe kun Lenin okazis en Kremlo la 21 Junio 1921.

M. Gorkij post la reveno el Italio estis ankaŭ dufoje kiel gasto en la societo "Espero" kaj parolis Esperante."

J. W.

LEGENDO PRI LA AMO

Nazim Hikmet: Esperanto estas muzikplena lingvo.

La artisma kolektivo de la Esperantista Klubo en Praha "Verda Ĉaro de Julio Baghy", gvidata de la geedzoj Seemann, dum la kelkaj jaroj de sia ekzisto sukcese prezentis sur scenejoj jam konsiderindan vicon da teatraĵoj kaj fragmentoj en Esperanto. Estis i.a. monologoj de s-anino Eva Seemannová el "Apokrifoj", "La afero Makropulos" kaj "R.U.R." de K. Čapek, "Ifigenio sur Taŭrido" kaj "Faust" (Goethe), "Elizabeta" (Machar), "La ombro" (Niccodemi), "Somero" (Šrámek), "La morto de Hipodamia (Vrchlický)", "La letero de Tatjana al Onjegin" (Puŝkin) kaj muntaĵo plurpersona el "La patrino" de K. Čapek. Ilin sekvas originalaj mallongaj dramoj en Esperanto "Granda ludo" kaj "Dum tondras la kanonoj" de J. Baghy, "Ni esperas" (el la vivo de Zamenhof) kaj la komedio "Ni korespondu" de A. Seemann (premiitaj en la Internacia Belarta Konkurso) kaj "Ĉe l' akvoj de forgeso" (M. Boulton). Siajn kapablojn montris la membroj ĉe V.Ĉ.J.B. precipe en la tutvesperaj teatraĵoj, tradukitaj, el naciaj lingvoj: "Maryša" de fratoj Mrštík, "Pigmaliono" de G. B. Shaw, "Nora" de Ibsen kaj lastfoje en la "Legendo pri la amo" de Nazim Hikmet.

La prezentadoj de la "Legendo pri la amo" okazis 15-an de majo kaj 7-an de junio 1958 en la teatro Malá scéna (Malgranda scenejo) en Praha. Por la dua, sabata, solena prezentado oni sukcesis akiri 50-procentan fervojan rabaton kaj tial ĉeestis esperantistoj eĉ el lokoj tre malproksimaj. Por ambaŭ prezentadoj aperis presita "programo" En tiu ĉi ludo kun fabeleca temo el Oriento pri nevenkebla forto de fidela amo, verkita de la elmigrinta turka poeto Nazim Hikmet kaj tradukita de Eva Seemannová, pruvis sian arton samideaninoj Seemannová, Řiháčková, Nývltová, Drapáková kaj samideanoj Seemann, D-ro Sádlo, Tichý, Kalivoda kaj Rybinski, en malpli grandaj roloj Kynčl, Novotný kaj Řiháček.

La solenan prezentadon laŭ invito ĉeestis la aŭtoro mem, Nazim Hikmet, kiu ĝuste en tiuj tagoj restadis en Praha. La fama poeto turka diris de sur la scenejo i.a.:

"Mi aŭdis mian teatraĵon jam en multaj lingvoj kaj landoj, ankaŭ en grandaj teatroj Kaj hodiaŭ je la unua fojo mi aŭdas Esperanton. Mi trovas, ke ĝi estas lingvo tre muzikala. Nenie mi estis tiel emociita kiel tie ĉi hodiaŭ, inter vi, amatoroj ... Mi ne scias, ĉu Esperanto fariĝos lingvo tutmonda kaj tio min ankaŭ ne interesas: tio povos okazi post tre longa tempo. Sed interesas min, ke jam nun ekzistas homoj, kiuj batalas por tiu ideo. Mi rekomendas, ke la gepatroj instruu al siaj filoj kaj filinoj Esperanton. Se mi estus pli juna, mi mem lernus ĝin. Mi deziras multajn sukcesojn al via batalo."

Dum la paŭzo Hikmet subskribis al ĉiu petanto la presitan programon kaj la rozojn el la ricevita florbukedo li disdonis al samideaninoj. Cetere lia konduto estis tre ĉarma kaj amika.

La poeton bonvensalutis la direktoro de la kleriga institucio Osvětová beseda en Praha 2, al kiu la Esperanta Klubo apartenas, k-do Filipin. Ĉeestis ankaŭ turkologo Blaskovic kaj rumana samideanino el Bukureŝto.

La "Legendo pri la amo" certe ne estas la lasta sukceso de la artisma kolektivo de EK Praha. La "Verda Ĉaro de Julio Baghy" havas unu dorlotatan ambicion: prezenti sin kun sia programo al la Universala Kongreso de Esperanto. Ĉu tio povos okazi en Varsovio 1959? J. Mařík

El la vivo de junularaj grupoj

HORAŽŔDOVICE. La grupo pretigis novan propagandan kesteton kaj regule aranĝas du montrofenestrojn. Fondita grupa kroniko (kronikisto inĝ. Maluŝ). Preparata estas komuna Esperanto-filatelista ekspozicio, stacidoma informtabulo. LD: František Mudra, Horažďovice č. 264.

Strakonice. Estis renovigitaj du inform-kestetoj kaj pretigita unu nova, kiu estos pendigita en alia parto de la urbo. LD: Věra Tomanová, Strakonice, II, Hallova 349.

LANŠKROUN. La konversacia kurso por infanoj bone progresas. Ni kunvenadas ĉiulunde en la Domo de pioniroj. Vizitas ĝin regule sep gejunuloj. Kvin el li partoprenis la tendaron apud

Vranov. La kurson pro komencantoj vizitas el dek nun ok ges-anoj. Kunvenoj estas ĉiumarde en Kleriga domo. Nun ili lernas 17-an lecionon laŭ Kilian lernolibro (majo). En la kurso por progresintoj ni kunvenadas unufoje en 14 tagoj. Ĉeestas 6 gesamideanoj. Lastatempe vizitis nin s-ano Schlezinger el Orienta Germanujo, kiu rakontis al ni kelkajn interesaĵojn. - Entute 10 membroj aliĝis al SET. LD: Naďa Jirečková, Lanškroun, Kollárova 344.

CHRUDIM. Gvidanto estas s-ano Karel Dušánek. La kurso, kiun aranĝis aŭtune, nun finiĝis per ekzamenoj. (16.4. - 9 gesamideanoj.) Ekzamentintoj estis s-anoj Štrechr kaj Zadražil. Al s-ano Dušánek helpas s-anino Čapská. Post ferioj okazos nova kurso elementa kaj ankaŭ la konversacia.

PARDUBICE. La kurso en 11-jara lernejo bone progresis ĝis la finiĝo en junio. La 31-an de julio ni aranĝos renkontiĝon sur Kunětická Hora, kaj seminarion de 27.-31.8. Sabate 30.8. ni povus aranĝi la kunvenon. Detalajn informojn sendas RD: Karel Franc, Pardubice, Dukla 2287.

KRÁLÍKY. Nova Esperanta rondeto ĉe OB regule kunvenadas. Estis elektita komitato de zorgantoj pri la aferoj de la rondeto. La rondeto perfektiga en Esperanto kaj zorgas pri elmontra kesteto sur la placo. Ĝi fondis ankaŭ la kronikon, entreprenas ekskursojn kaj montras grandan iniciativon. Ĝi volas kontakti kun la grupoj en ĉirkaŭaĵo. Adreso de la gvidanto: Josef Otta, Červená Voda 165, okr. Zábřeh n/Mor.

OSTRAVA VŽKG. Ni organizis ekskursojn al Beskydy por gajni insignon "100 printempaj kilometroj". 24 membroj sukcese atingis ĝin. Niaj anoj aktive helpas per labor-brigadoj efektiviĝi SET Žirovnice. En Ostrava – Vítkovice ni gajnis novan porpropagandan montrofenestron en apoteko. Ni preparas eldonon de esperantlingva poŝtkarto al honorigo de 130-jara datreveno de VŽKG. - ZK VŽKG riparas la Sindikatan domon per libervolaj laborbrigadoj. Esperantistoj jam dediĉis 230 horojn kaj enviĉis je la 1-a loko el ĉiuj fakoj de la uzina klubo.

JAKARTOVICE - D.ŽIVOTICE - OPAVA. 23.3. en Silezia Muzeo en Opava estis instalita ekspozicio pri agado de instruistaro en la distrikto Opava. Tre interesan angulon formis ekspozicio de la lernejdirektoro J. Hadámek kaj de la instruistinoj Hostašová kaj Matýsková el D. Životice, en kiu estis ekspoziciita iliaj esp. korespondaĵoj el eksterlando, eksterlandaj desegnaĵoj kaj lernolibroj. Samtempe en apudaj ĉambroj de la muzeo estis aranĝita filatelista ekspozicio, kie estis ekspoziciita motiva kolekto de la lernejdirektoro J. Hadámek el Jakartovice: "Esperanto - lingvo de paco kaj progreso sur poŝtaĵoj."

LOKAJ DELEGITOJ de la JUNULARO. Restarigo de la delegita reto estas preparata. Nuntempe en multaj lokoj ankoraŭ mankas la delegito, ni esperas publikigi la nomliston en la venonta numero. Nur RD el regiono Plzeň Josef Sladký (Výhledy 54, Holýšov) sendis kompletan liston.

Ni atentigas nur je LD por junularaj aferoj en:

PRAHA: Jaroslav Mařík, Praha II., Malá Štěpánská 9. Precipe la eksterlandanoj, vizitante Pragon, turnu vin ĉiam je li.

OSTRAVA - HULVÁKY. Esperantista grupo organizis jam la duan viziton de loka observejo por rigardi la lunon.

OSTRAVA - TRAMISTOJ. La regionan kunvenon en Třinec (monto Javorový) vizitis la grupo multnombre per aŭtobuso.

OSTRAVA - MICHÁLKOVICE. La grupo ĉe la minejo Petr Cingr sendas 5 siajn membrojn al SET Žimrovice. La uzina klubo pagas la restadon al unu el ili.

STONAVA. Nia esperantista rondeto estis fondita komence de jaro 1956. Nia ĝisnuna agado estas informado de la vilaĝa loĝantaro pri la ekzisto kaj grava celo de la internacia lingvo Esperanto. Por tiu celo ni aranĝis daŭran ekspozicion en elmontra fenestro. La kurson por komencantoj ni aranĝos aŭtune. Sekretario: Karol Zipser, Stonava 14, okr. Karviná.

JESENÍK. Ekde sia fondiĝo (1.11.1955) la grupo bone progresas. La kurson vizitas 14 lernantoj. Ĉiuj membroj konkuras en la kurs-vizito kaj prospero. La plej bona membro ricevas kiel premion la libron "Gorejnsko" kaj la plej sukcesa lernanto la libron "Martin Krpan". La libroj estas

eldonitaj en Jugoslavio kaj alportis ilin Lucka kaj Marica Užmahovič el Celje, kiuj estis vizite ĉe s-ano V. Pečinka (oficisto, zubní ambul., Jeseník).

ŽĎÁR n/Sázavou. Komparante la nunan jaron kun la jaroj antaŭaj, ni devas konstati gravan progreson, nome, ke ĉiuj kursoj ne plu estis gvidataj de unusola persono. Nia grupo nun jam disponas pri kelkaj instruistoj. Entute okazis nunjare 5 kursoj: 1. infana por komencantoj, 2. infana por progresantoj, 3. por plenkreskaj komencantoj, 4. por plenkreskaj progresantoj kaj 5. kurso konversacia. Instruis: Bečková, Kremláčková, Kremláček, Krča kaj Schmitt.

Estis aranĝitaj du muzik-literaturaj vesperoj. La unua okaze de la naskiĝtago de nia Majstro, la dua sub titolo "Renkontiĝo kun Raymond Schwartz". La programo estis kompilita nur el la verkoj de Schwartz kaj la verkisto ĉi-okaze sendis al nia grupo salutleteron.

Laŭ iniciato de s-ano Kremláček ni decidigis ekde jaro 1958 aranĝi ĉiun kvaronjaron ekspozicion pri iu lando. Februare estis aranĝita ekspozicio pri Japanio. Ĝi estis instalita en publika urboleĝejo kaj en daŭro de 4 tagoj vizitis ĝin 593 personoj. La dua temis pri Bulgario kaj daŭris de la 22-a ĝis la 29-a de junio. Ĝi estis elmetita en la distrikta Domo de Pioniroj. Tre ĝojiga fakto estas, ke la lasta ekspozicio estis aprobita de la distrikta lernejspektoro kaj per speciala cirkulero de li rekomendita al lernejoj. Fakte venadis la tutaj klasoj kun instruistoj. Laŭ subskriboj en la libro de vizitintoj vizitis ĝin entute 1026 personoj.

Por ne perdi kontakton kun niaj grupanoj dum ferio ni intencas laŭeble aranĝi vesperajn bivakfajrojn.

Březina

TŘINEC. La esperantista renkontiĝo de la regionoj Ostrava kaj Olomouc en Třinec (28.-29.6.) sukcesis malgraŭ pluva vetero. La projektita dimanĉa ekskurso al la monto Javorový (anstataŭ Ĉantoria) ne okazis. La renkontiĝon partoprenis ĉirkaŭ 150 ges-anoj. En la sabata estrada programo debutis polaj knabinoj el Cieszyn, kies kanta trio ravis ĉiujn kiuj elvokis tondran aplaŭdon. En la programo bone prezentiĝis ankaŭ Innularo Ostrava kaj tri knabinetoj el Třinec. Por danco ludis entuziasme junula ĝazorkestro.

La dimanĉa kunveno traktis historion kaj nuntempon de Someraj Esperanto-Kolegioj kaj tendaroj en ĈSR. La ĉefan referaton havis D. Kočvara. En nomo de la polaj gastoj parolis Ing. Z. Glajcar kaj Prof. S. Juswowa el la pedagogia liceo en Cieszyn, kie aktivas Geografia rondo esperantista. La pluan regionan renkontiĝon pretas organizi s-anoj el Vsetín.

El Germana Demokratia Respubliko.

Karaj geamikoj en ĈSRN.Ni, samideanoj en la najbara respubliko legas kun randa ŝato vian bonegan revuon "Tagiĝo". Akcentu nian koran dankon por la alsendo. Se vi nur malmulte aŭdas pri ni, ne opiniu, ke la samideanoj en DDR dormas. La 15-an de majo, kunvenis 54 geamikoj, plejparte gejunuloj, el 15 lokoj inter la riveroj Elbe kaj Neisse, en orienta Saksio, sur la monto Picho en la pejzaĝo Luzacio. De tie ni rigardis al via lando, tiel proksima kaj tamen tiel fora... Karaj ĉeĥaj gesamideanoj, ni sopire atendas la tagon, kiam ni vizitos vin kaj vi nin, por komune festi kaj ĝoje praktiki la interpopolan amikecon! Je la Novjaro pasigis juna norvega samideanino belan semajnon en Pirna, montrante koloran parolfilmon pri Oslo, kaj nun estas sveda samideano nia kara gasto en Dresden. Venu ankaŭ vi, karaj ĉeĥaj amikoj, vi estos ĉiam bonvenaj!

P. Glöckner, Pirna, del.de UEA

Por veturontoj al GDR.

Ĉiu esperantisto, kiu intencas vojaĝi al Leipzig, kontaktu al la Esperanto-junular-peranto Hieronymus Stroinski, Bosdorf bei Leipzig, Koloniestr. 10. S-ano Stroinski ŝatos renkonti niajn esperantistojn el Ĉedok-karavanoj.

75 jaroj de D-ro Augustin Pitlík.

24.7.1958 fariĝas 75-jara nia malnova pioniro D-ro Augustin Pitlík. Li asertas kun rideto, ke Esperanto junigas. Kaj efektive lia jubileo venis kvazaŭ nerimarkate - li ĉiam restas ankoraŭ vigla.

Estis D-ro Pitlík, kiu antaŭ 35 jaroj faris la unuan esperantlingvan radioparoladon. Kaj pasis

jam maro da jaroj de kiam li funkciis kiel ĝenerala sekretario de la Universala Kongreso de Esperanto en Praha, en 1921. D-ro Pitlík estis ankaŭ la unua esperantisto, kiu realigis grandan eksterlandan vojaĝon kun prelegoj en Esperanto, jam antaŭ la unua mondmilito. Li gvidis la ĉeĥoslovakajn Esperanto-instituton. Post la dua mondmilito li sukcesis restarigi Esperanto-lectoraton en la Altlernejo por specialaj sciencoj. Kaj en la lastaj jaroj li funkciis kiel direktoro de la Somera Kolegio de Esperanto en Doksy. Ni salutas lin kiel pioniron de Esperanto kaj ankaŭ kiel amikon de la juna esperantistaro, dezirante al li fortikan sanon kaj ĉiaman rideton en la pluaj vivojaroj.

František Hájek 75-jara.

Tiu ĉi samideano en Praha, kiun ni konas el la histori-lecionoj en SET kiel "esperantiston de la unua horo", atingis la altan aĝon. Li fariĝis esperantisto kiel knabeto, frekventinte kurson de Esperanto, kiun gvidis en Praha Fr. VI. Lorenz. En postaj jaroj li gvidis ŝak-rubrikon en "Esperanto". La veterano estu salutata de nia junularo!

Helpu Esperanto-ekspozicion!

En Stokholmo estas aranĝata en la unua duono de septembro ekspozicio por propagandi Esperanton inter gejunuloj. Certe taŭgos fotografaĵoj el niaj tendaroj, poŝtkartoj, koncizaj raportoj, muziknotoj kaj tekstoj de junularaj kantoj k.a. Adreso: S-ano Yngve Törnlund, Högbergsgatan 111, Stockholm Sö, Svedio.

Bonvolu skribi multajn alvokojn al Radio Budapest,

ke vi interesiĝas pri vivokulturo kaj progreso de la hungara popolo. Je peto de finnaj aŭskultantoj oni disaŭdigis en la finna duonhoraj Esperantan intervjuon kun s-ano P. Balkányi. Petu intervjuon ankaŭ kun s-anoj Baghy, Kalocsay k.a.

El landa Packongreso hungara.

Dufoje oni parolis pri Esperanto, du esperantistoj (k-doj L.Domokos kaj V.Novátius) estis elektitaj kiel membroj de la Landa Packonsilantaro. V.Novátius, kiu nur antaŭ kelkaj jaroj komencis lerni Esperanton, ricevis pro la sukcesa fervora pacagado (ĉefe per Esperanto!) la registaran distingon: ordenon "Por socialista laboro".

Sukcesa junulara ekskurso (Hungario).

La budapesta junulara Esperanto-fakrondo de fabriko "Beloianis" kun membroj de la E.rondo de MÖM-kulturdomo aranĝis la 25-an de majo sukcesan komunan viziton al la urbo Esztergom. Ili havis apartan, pere E.flago ornamitan vagonon, kiun dumvoje en Dorog esp. fervojisto salutis per E.flago kaj en Esztergom atendis la ekskursantojn la loka esperantista junularo. La malnovan ĉefepiskopan kaj nun speciale sciencan urbeton samtempe vizitis ankaŭ unu bulgara studentino el SOFIO kaj makedonaj knabinoj. Vizitita estis ankaŭ la Esperanto-strato. Pri la ekskurso internacia raportis kan fotoj la uzina revuo de la menciita fabriko.

"La Esperantista Studento".

En Parizo estas eldonata "La Esperantista Studento", ĉiumonata bulteno, ĝis nun aperinta en franca lingvo kaj en Esperanto, sed kiu verŝajne aperos nur en Esperanto, ĉar ĝi fariĝos bulteno de la francaj kaj italaj esperantistaj studentoj. ("LES", 34 rue de Chabrol, Paris 10°)

En Parizo fondiĝis Verda Stelo Junulklubo, kiu havas pli ol 60 membrojn.

Malfacilaĵoj pro "SPUTNIK". En pola Bialystok oni decidiĝis doni al la nova kinejo popularan nomon SPUTNIK kaj tiel oni venis en malfacilan situacion. Kvin kasistinoj, unu post alia, anoncis sian maldungiĝon. Ili tiel agis kaŭze de tio, ke vizitantoj de la kinejo alparolis la kasistinojn – "LAJKO".

Ĉervený květ

kulturpolitika monatgazeto de la regiono Ostrava. — En la 7-a n-ro denove aperis du informetoj pri Esp-o. S-ano A.Staňura estis vizite en la redakcio kaj parolis kun la ĉefredaktoro D-ro J.Průša, kiu promesis publikigi en ĉiu numero informon pri nia movado. Estus tre konvene, se esperantistoj abonus tiun ĉi revuon. Se abonos 400-500 esperantistoj, la redaktoro estos preta disponigi pli da loko al nia afero. Aldonite vi ricevas ankaŭ la propagandan flugfolion de tiu ĉi gazeto. Ni rekomendas al vi ĝian abonon ankoraŭ en nuna jarsezono.

JURO MEVO:

Kanto pri dolĉa akvo apud Vranov

Rakontas kvar bravulinoj el Brno: Věra Kořínková
Věra Podhradská
Jarka Novotná
Jarka Rybová

Ĉiuj: Plaŭdas plaŭda plaŭd'...

V.K.: Ne sulketas maron argonaŭt',
sed vent' petola flugas
kaj ĝueme plugas
brilan lag-spegulon.

Ĉiuj: Plaŭd'... plaŭd'...

V.P.: Jen sur roko blovo tuŝis eĉ betulon -
sube ondon sekvas onde kaj reondo...
Fefabela lud'

Ĉiuj: kaj sen sceneja rondo. -

J.N.: Tie en la foro,
kvazaŭ en vespera horo,
ĉio duonlume sobras
kaj nebulo kovras
molkolorojn de la nupta ligo
inter akvo - tero, algo kaj filiko.

Ĉiuj: Plaŭd'... plaŭd'.

J.R.: Tie en natur' sovaĝa,
sur dekliv' de monto aĝa,
meze de centjaraj arboj
ne plu vojon baras bruaj ĉardoj,
sed herbejon markas per makuloj
kaj provizas aron de la kuloj
per homsango,

V.P.: malgraŭ plendoj,

Ĉiuj: dudek tendoj.

V.K.: Tendaranoj kun 1a SET en ŝildo
sin prezentas kiel bela bildo.
Esperanton studas, sin sunumas,
sportas kaj sekrett amindumas...

V.P.: Nubo, fulmoj, pluvalveno,
pest' kaj karabeno!

V.K.: De la bela tuta – nur duon'!
V.P.: Ĉu malgravas bela region'?
Ĉu malgravas dolĉa akvo, rokoj? –
Prave de vetero venas pluvaj mokoj!
Lerni estas via ĉefprogram'...

J.N.: Eĥ, silentu jam!
J.R.: Ĝi signifas ja nenion!
Eĉ se akvo rompus la valdigon,
ĉion trakti gajhumore
vere scias ni aktore

J.N.: kaj precipe dek knabinoj,
ĉiuj ĉarmaj brnaninoj:

V.P.: Jarka, Věra kaj Miladka
J.R.: kaj refoje Věra, Jarka,
J.N.: al dekopo apartenas ankaŭ Hana,
V.K.: ankaŭ Marta, Fany, Lída, eta Jana.

Ĉiuj: Ĉiuj po du loĝas en malgrandaj tendoj
V.K.: po du spitas sen tro laŭtaj plendoj
kontraŭ pluv-skandaloj

J.N.: sen kanaloj,
sen ŝipar',
J.R.: eĉ sen seka ŝuo-par'.
V.P.: Tamen ĉio bagatelas,
ni malsekaj en kabanon sekan celas,
ŝtelirante paŝ' post paŝo
ĝis agrabla subkovrila kaŝo.

V.K.: Sen sci' de la kabanestro
ĝin kapablas nur de lerta ago estro.

J.R.: Frumatene ree for,
en tendaron al labor',
al lernado kaj al sportoj...

V.K.: Ĉu sufiĉas al vi la moderaj vortoj?
J.N.: Vortprezento tiom palas. –
Kredu! la realo ĝuste malas! —

Ĉiuj: Ĉar ni nune spertas pli
J.R.: ol ekzemple spertas vi,
Ĉiuj: ni bonvolas vin inviti,
J.R.: sed samtempe ree citi:
V.P.: nepre tie loĝu

Ĉiuj: en barelo
V.P.: kun amiko
Ĉiuj: pluvombrelo!

V.K.: Plaŭd' ... plaŭd' ...
Ĉiuj: aŭ vi estos argonaŭt'.

Zdeněk Čapek: *Margareto*

Multfoje mi pripensas mian vivon. Kvardek tri jarojn de mia vivo. Plej riĉaj rememoroj haltas ĉe mia junaĝo kaj ĉe tempo de miaj studoj. Tiuj rememoroj donas al mi kvieton.

Mi ankaŭ rememoras la lastan militon, el kiu mi revenis kun trapafitaj pulmoj kaj kun vundita koro. Dum tiuj ĉi rememoroj la kvieto perdiĝas.

Nelonge antaŭ la milito mi fariĝis maŝiningeniero. Vivo sendependa, paca vivo min atendis. Sed furio de l' milito komenciĝis kaj detruis pacan vivon de ĉiuj homoj.

Mi travivis la militon sur diversaj militŝipoj. La lasta ŝipo, sur kiu mi servis, nomiĝis "Darling". Septembre 1945 ni ankris apud Tokio.

La milito jam finis kaj ni ankoraŭ ne povis reveni hejmen. Nek mi, nek Tom, mia amiko, kiu servis sur la sama ŝipo kiel mi.

Kaŭze de la milito mi fariĝis malĝentilaj kaj barbaraj. Ni eksciis tion tre klare, kiam mi, Tom kaj la ceteraj miaj amikoj partoprenis amuzvespereton, aranĝitan de infanterietoj. Ni amuzis nin bonege.

Tom konatigis min kun siaj amikoj. Ili konis nek triston, nek riproĉojn de la konscienco. Unu el ili avertis min dum konversacio pri la militaj spertoj, ke la amuzvespereton partoprenas unu interesa virino. Sekretariino de majoro M. Ŝi havas admirindan ĉarmon. Viroj luktas, kiu gajnos ŝian simpation, sed neniu venkis ankoraŭ. Ŝi preferas neniun viron.

Longan tempon mi hezitis ĉi-vespere. Ia stranga antaŭsento ekestis trudiĝeme en mia kapo.

Fine mi petis ŝin danci kun mi.

Ŝi dancis kiel najado. Subite en niaj animoj ekscitiĝis embaraso, kiun mi volis kaŝi per ekstera bonkoreca parolo kaj per spritaĵoj. Sed ĉio sonis surde kaj malvere.

Mi ĉesis paroli.

Ŝi ankaŭ.

Ritmo de la muziko fariĝis mastro de la salono.

Niaj okuloj renkontiĝis. El mia buŝo venis jenaj vortoj: "Vi havas profundajn okulojn, kiel arbara fonteto." Ŝi respondis dolĉe: "Atentu, ke vi ne dronu."

Mi sentis, kiel ŝi moliĝas en miaj manoj. Ia sorĉo nin envualis. Niajn korpojn. Niajn korojn. Kaj per tuŝo ĝi aperis kiel mirakla ama pasio. Racio malfortiĝis. Regas nur kristala sopirplena sento.

Kiam ni ĉesis danci, mi denove ekrigardis ŝiajn brunajn, profundajn okulojn. Streĉo, kiu pendas en aero, streĉo elvokita per akra sopiro de ni ambaŭ xxxx. Sopiro, kiu promesis esti plenumita kulmini xxx, ni ekridis per ŝtormega rido.

Margareto (ŝi nomiĝis Margareto) estis ne nur ĉarma, sed ankaŭ tre klera kaj ŝercema virino.

Ni sciis ambaŭ, ke ni havas ion por diri al la alia.

Malfrue vespere mi akompanis ŝin ĝis la domo, kie ŝi vivis. Ŝi loĝis en mallarĝa, malnova strateto, en antikva parto de la urbo. Nomon de tiu strateto mi rememoras ĝis hodiaŭ: Ogasawara-mura.

Ni renkontiĝis poste dufoje aŭ trifoje. Mi precize memoras tion.

Kaj venis la tago, kiun mi rememorigas amare kaj trite. Hazarde mi vidis ŝin kun fremda viro!

Io rompiĝis en mi. Io rompiĝis kun bruo en mia animo.

Mi terure amis ŝin. Ĝis tiu tempo mi ne konis tiel fortan pasion. Estis tio amo, kiun homo vane serĉas tutan sian vivon. Mi havis feliĉon renkonti ĝin. Unufoje en mia vivo. Kaj probable lastfoje. Mi sciis, ke ankaŭ ŝi sentas ion similan, sed io subite rompiĝis en mi.

Rezultis, ke mi kaj Tom vizitis Joŝivara-n. Ni diboĉadis preskaŭ tutarn nokton. Mi trinkis pro doloro. Kaj Tom trinkis kun mi.

Tra malhela nokto ni stumbladis, ŝanceliradis kaj kriadis sensencaĵojn. Mi ne scias, ĉu tio estis mi aŭ Tom, kiu proponis tion. Ni faris veton (venkonto ricevos botelon da Whisky), ke ĉi-nokte mi vizitos Margareton.

Post duonhoro ni kuraĝe kaj kun bonhumoro venis en la strateton, kie ŝi vivis.

Len la strateton Ogasawara-mura.

Peza pordo estis ŝlosita. Ni vane skuegis kaj frapis.

Nesciante, kion fari, ni staris meze de la strateto. Senintence mi ekprenis ŝtoneton en mian manplaton kaj kun malcerteco mi ĵetis ĝin furioze en ŝian fenestron

Tom ĵetadis ankaŭ. Ŝajnis, ke ni trovis interesan amuzon. La ŝtonetoj ŝutiĝis en la fenestron, multfoje mistrafe.

En pluraj fenestroj komencis elrigardi vekiĝintaj homoj. Mi ne vidis tion. Fikse mi observis la fenestron. Ŝian fenestron! En unu momento mi ekvidis helan ombreton flagreti malantaŭ la obskura fenestro. Sed estas fakte, ke tion kaŭzis nur mia fantazio.

Tuta skandalo finiĝis per alveturo de militgardo, kiu forveturigis nin en la kazernon.

Vekiĝinte matene kaj konsciinte pri la lastnoka skandalo, pri rezultoj de miaj faroj, mia animo pleniĝis per turmentoj kaj riproĉoj.

Tio signifis finon. Finon de la amo al Margareto.

Kelkfoje ni renkontiĝis hazarde en strato aŭ on oficejo, ni agis kiel nekonantaj unu la alian.

Unufoje mi turnis mian kapon sekvante ŝin per okuloj. Mi vidis, ke ankaŭ ŝi turnis sian kapon kaj ŝiaj brunaj okuloj parolis pri tristeco kaj malespero.

Ŝi eble ankoraŭ amis min.

Ne plu mi vidis ŝin.

Poste mi eksciis, ke tiu juna viro, kun kiu mi vidis ŝin, estis ŝia frato. Sed estis malfrua tiu sciigo. Ŝi jam forlasis Tokion kaj ankaŭ ni faris preparojn al forveturo hejmen.

Mi vivas jam kelke da jarok en mia naskiĝurbo Leeds. Mi edziĝis kaj mia edzino prizorgas min kaj tri miajn infanojn kun kompreno kaj amo. Mi amas la infanojn kaj ŝatas la edzinon, kiu kreis hejmon por mi. Ŝi ne komprenas al mi, al mia opinio pri senco de la vivo. Ŝi scias nenion pri eĥo de rememoroj, kiuj flugas ofte en strateton Ogasawara-mura.

Longe mi akuzadis la severan faton pro malfavoro, sed nun mi scias, ke ni, homoj, multfoje direktas faton, direktas nian estontecon. Hodiaŭ mi tion scias, sed tiam, en la strateto Ogasawara-mura mi tion ankoraŭ ne sciis.

Kie vivas mia kara Margareto?

Ĉu ŝi iam rememoras min?

Probable ŝi edziniĝis kaj havas infanojn kaj feliĉan familion. Same kiel mi havas. Probable...

Mi rememoros Margareton ĝis fino de mia vivo.

Eble mi renkontos ŝin neatendante tion. Dum iu ordinara, griza tago. Mi ekrigardos ŝiajn brunajn okulojn kaj mi diros: "Margareto..."

(Konkursa kontribuaĵo - tasko 3.)

Sputniko orientale - recepto

Anglan lardon metu sur la fritilon kaj lasu ĝin friti ĝis ĝi aspektos kiel vitra. Poste almetu disfrotitan ajlon, ete distranĉitan bulbon, surŝprucu per iometo da tomata suko, surmetu ovojn kaj ĉion senmikse lasu friti. Kiam la ovoblanko estas fritita, demetu de sur la fajro kaj nur malmulte ŝmiru per mustardo kaj sursutu skrapitan krenon. Saligu laŭguste. Ale vi povas manĝi salaton (laktukon) kun laktokremo. — "FRANDULO"—

Ĉu vi korespondas kun ĉasisto de leonoj?

La korespondado kun aliaj landoj per Esperanto profundigas niajn sciojn kaj formas fadenojn de interpopola amikeco. Eble ĉiu el ni havas inter siaj leteramikoj iun, kiu estas interesa per ia specialaĵo. Sed ni konsentas, ke ne ĉiu posedas tiel kuriozas korespondanton, kian havas en Afriko nia konata juna samideanino V. P. el Brno.

Kun letero el Afriko venis foto de la amiko staranta, kun pafilo enmane, per unu piedo sur la kapo de la ĵus pafita elefanto. Aliffoje la foto prezentis lin apud aŭtomobilo, sur kies tegmento ŝnurligita sukcese ĉasita leono. Kaj triafoje – ne, neniu bestego plu – li staras inter sia granda

bovinaro, paŝtanta sin apud lia farmo. Kun tiu foto venis la ... edziĝpropono.

Sed ni volas kredi, ke nian samideaninon forlogos el nia mezo nek elefantoj, nek leonoj. Ni tamen devas konfesi, ke certe estas interese havi tian korespondanton en la nigra kontinento.

X

ESPERANTO EN FESTIVALO

Sub tiu ĉi titolo eldonas Bulgara festivala Esperanto-grupo (poŝtkesto 44, Sofia) organon de la festivalanoj parolantaj Esperanton.

La VII-a Tutmonda festivalo de la junularo kaj studentoj estas malfermota la 26-an de julio en Vieno (1959).

La partopreno de pli ol 250 geesperantistoj el 31 landoj en la VI-a festivalo en Moskvo pruvis al ĉiuj skeptikuloj la ekskluzivan taŭgecon de Esperanto.

La Bulgara festivala Esperanto-grupo vokas al ĉiuj landaj junularaj Esperanto-organizoj: fondu festivalajn grupojn! Aŭtune estos organizita Internacia festivala komitato por enkonduko de Esperanto en la festivalon. En la komitaton eniros po unu membro el la landaj festivalaj grupoj.

La esperantista grupo ĉe la profesia teatro "Trudov Front" en Sofia pretigis en Esperanto programon, per kiu ĝi partoprenos la Tutbulgaran junularan festivalon. El la aktoroj komisiono elektos gejunulojn, kiuj reprezentos Bulgarion en la VII-a festivalo.

Gejunuloj de la Filma sekcio de Bulgara esperantista asocio okaze de la festivalo pretigos filman scenaron je temo "Esperanto kaj la festivaloj". Oni intencas filmigi la Esperanto-aranĝojn dum la VII-a festivalo.

Ĉeĥoslovakio. En afero de la festivalo skribu al lia sekciestro: Draĥ. Kočvara, Ostrava VIII. Kamenec 251/3.

DE NIA AKTIVA KLOPODO DEPENDAS LA GRANDSKALA UZO DE ESPERANTO EN LA VII-a TUTMONDA FESTIVALO DE LA JUNULARO KAJ GESTUDENTOJ!

FESTIVALA KONKURSO

La redakcio de la bulteno "Esperanto en la festivalo" aranĝas konkurson. En ĝi povas partopreni ĉiuj geesperantistoj.

K o n d i ĉ o j:

1. Verki versaĵon dediĉitan al la Internacia festivalo de la junularo kaj studentoj, al la paco, amikeco kaj Esperanto.
2. Verki kanton dediĉitan al la festivalo, Esperanto, la paco kaj la amikeco.
3. Desegni karikaturon dediĉitan al la forigo de la multlingveco en la festivalo kaj al oficialigo de Esperanto.

L i m d a t o: La 1-a de marto 1959.

En la komisiono, kiu prijuĝos le verkojn de la konkursantoj, estas: Stojan Guĝev, profesoro en la Bulgara konservatorio, Asen Grigorov, redaktoro de la revuo "Nuntempa Bulgario", Canko Murgin, Kiril Draĥev, redaktoro de la ĉiusemajna bulgara humora gazeto "Tabano" kaj Atanas Atanasov-Ada, akademiano.

La plej bonajn verkojn ni premios per valoraj objektoj.

La verkon kaj la nomon de la verkinto(j) oni sendu al la redakcio (poŝtkesto 44, Sofia, Bulgario) en apartaj kovertoj, sur kiuj oni skribu pseŭdonimon.

KONKURSO DE TAGIĜO

La 5-an kaj 6-an taskon (39-a n-ro) sendis nur tre malmultaj legantoj. Ni do decidiĝis plilongigi la limdaton por la forsendo ĝis la fino de aŭgusto. Ne preterlasu ĉi okazon kaj partoprenu ankaŭ en la lastaj du taskoj.

Ni atentigas, ke nin interesas speciale ĉefaj libroj porjunularaj, tradukindaj esperanten. Kelkaj samideanoj erare menciis librojn el alinaciaj literaturoj.

La redakcio

... Ni ne estu, ne estu tiom mallaboremaj, aliajn nur rigardante kaj post aliaj rampante en distanco.

Penu, ke ankaŭ la aliaj en io nin vidu antaŭ si !!

Jan Amos Komenský - Didaktika

LEKANTETO - porinfana paĝo de Tagiĝo, estis en ĉi numero ellasita. Ŝajnas, ke mankas pri ĝi intereso el flanko de la infanoj. Mankas ankaŭ konvena originala materialo. Ĉu denove enkonduki ĝin? Decidu vi - la legantoj!
Red.

Nia bulteno

Infano uzas Esperanton kiel naturan lingvon. Jam etuloj bone komprenas kaj eĉ per pensis Esperante. Tion pruvas interalie raporto de germana amiko Willi Brandenburg en "Gepatra Bulteno":

""Li estas preskaŭ trijara, ne pli inteligenta ol samaĝuloj, ne pli vigla aŭ petolema, ol najbaraj infanoj. Sed... li babilas nian lingvon. Nur koncize mi citas kelkajn dialogoetojn kun nia Guiĉjo, kiuj eble pli multe eldiras pri tio.

Ĉe la manĝotablo. Mi opinias la momenton taŭga por kontroli lian lingvan progreson. "Kie estas via buŝo, Guido?" - "Tie estas mia buŝo", indignite, kvazaŭ li dirus: "Kia demando?". Sed mi daŭrigas: "Kaj kio estas tio?" - "Olel... okuloj" - "jes, Guido, okuloj - por...?" - "Por vidi", helpas Ulriko, la pli aĝa frato. "Jes, vidi", eĥas Guido. "Kaj per kio vi aŭdas, Guiĉjo? Ĉu per la nazo?" - "Ne, per la nazo ne!" - "Sed per kio do vi aŭdas?" Trumpetas Guido: "Per la radioaparato!" Kion mi kontraŭdiru?

Kiam en iu dimanĉo panjo vestis nian bubeton, ŝi klarigis en Esperanto: "Jen brako, la genuo, kruro kaj jen piedo." Panjo daŭrigas vesti lin kaj ekzerce demandas montrante lian piedon: "Kaj kio estas tio?" - "Estas ŝuo", li konstatas. "Mm, jes, sed kio estas en la ŝuo?", plu demandas panjo. "Estas ŝtrumpo." Nekontesteble! Sed panjo persistas: "Kaj kio estas en la ŝtrumpo, Guido?" - "Estas truo!" La panjo ĉesas demandadi."
de W.B.

JUNEGA ESPERANTISTINO

Leonka Rýznarová el Čtyřicet Lánů apud Svitavy estas sesjara knabino. Printempe ŝi vizitis kun sia esperantista onklino Šumavanská la Esperantistan klubon en Praha kaj ŝi atente sekvis la esperantlingvan programon. Kora aplaŭdo sekvis ŝian bele diritan esperantlingvan saluton, kiun ŝi alportis de la esperantista junularo en Svitavy al la kluba junularo en Praha.

(jm)

Hungaraj pioniroj korespondas

"Kiom da leteroj... Ili varikolora amaso kovras la tutan skribotablon. Iliaj poŝtmarkoj proksimigas la pejzaĝojn de malproksimaj landoj...", tiel skribas hungara gazeto pri korespondado de hungaraj pioniroj.

"Ĉiutage la poŝto alportas 40-50 eksterlandajn leterojn al la Federacio de Hungaraj Pioniroj, sed eĉ tio okazas, ke 100-200 venas je unufojo. Rusaj, germanaj, francaj - kaj kiu povas menci ĉiujn naciojn – infanoj petas la federacion, ke ĝi zorgu pri simila hungara korespond-amiko."

"La korespondado de la infanoj havas diversajn kaŭzojn. Ili estas scivolaj pri la vivo de infanoj en aliaj landoj, aŭ ia kolektemo instigas ilin aŭ simple la lingvo-ekzercado. Sed kio ajn estu la origina celo, dum la korespondado infanoj de malproksimaj landoj reciproke pliproksimiĝas, naskiĝas amikeco kaj tri vortoj "Amikeco de popoloj" fariĝas realo jam en ilia junaĝo. La infanoj estas tre inklinaj al ĉio. Oni povas ilin agordi al bono, sed ankaŭ al malbono. La pensoj, sentoj en tiu ĉi ago plej forte efikas, evoluas, firmiĝas. Pli frue oni semis inter troan nacian senton, ŝovinismon. En la popoldemokratioj oni edukas ilin al la amikiĝo de la popoloj."

Laŭ Pál Balkányi

SET 1956

Petr Kříčka: Ascendu al ĉiel' nia flago,
signo de juna kaj ĝoja sent',
ni bonvenigas vin, nova tago,
per kant' fluganta al firmament'.
Sunaj radioj nin logas
flugi en alton al sun',
kanti en brila sunlum',
al flag' saluton ni sendas nun!

El la ĉeĥa trad. J.Cink

Vokas nin Žimrovice! Atentu, vokas SET ŽIMROVICE!

Parolas nia speciala reportero Vagabond:

La tendaro finiĝis sukcese. Speciala danko apartenas al s-ano Sankta Petro, kiu fuŝis nur la unuajn du tagojn. Poste li montris sin kiel ĝentlemano. La varmego devigis la kursanojn studi plejparte en kaj sub akvo.

La gradoj kulminis en la lasta tago. Ĉiuj kursanoj ŝvitis kiel ĉevaloj, ĉar ili estis ŝarĝitaj per ekzamenoj, kiujn okazigis la tendara instruistaro pro siaj sadismaj kapricoj. Ĉiuj travivis la ekzamenojn en plena sano.

La tendaro estis vere "internacia". Partoprenis samideanoj el diversaj vilaĝoj, ankaŭ el Praha kaj Brno kaj ĉiuj bone interkompreniĝis. El eksterlando venis nur s-ano Marek Anteckí el Varsovio.

La kuiristinoj estis ĉarmaj, pro malsato oni ne suferis, tial ankaŭ la humoro estis bongusta. La bonhumoro ludis ĉefan rolon dum vesperaj bivakfajroj. Montriĝis, ke nia junulara rondo estas provizita per sekretaj aktoraj kaj kantistaj talentoj. Kantis eĉ Lad'a Adámek.

Ĉar por dimanĉo la 13-a de julio estis anoncita la kunveno de junularaj delegitoj, celis jam sabate al SET densaj vicoj de esperantistoj. La tendarestro havis la kapon plenan de zorgoj kiel la amason loĝigi. La problemon solvis kuraĝaj gejunuluj, kiuj sen tranoktis sub ĉielo, apud fajro, ĉirkaŭitaj de rokanta sovaĝa bestaro, nome de aproj.

Dimanĉe okazis la kunveno. Ĉeestis delegitoj el 19 lokoj. Oni taksis la nunan staton de la movado (sufiĉe kritike) kaj diskutis la taskojn, kiuj fontas el progresoj de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato. Pri la rezultoj de la traktado estos sciigitaj la grupoj aparte.

Kiel mi eksciis de la SET-anoj, okazis ankaŭ kelkaj ekskursoj en la plej belajn lokojn de la regiono.

Ĉar mi ne volas ankoraŭ pli prokrasti aperon de la 40-a n-ro de Tagiĝo, mi finas esperante, ke la frekventintoj mem superŝutos la redakcion per amaso da impresoplenaj kontribuajtoj.

Va-do

SUPERVIDO DE LA NOMBRO DE KURSANOJ EN "SET":

(Inkluzive de la teknika personaro)

ŽIMROVICE — partoprenis 42, el tio 31 kursanoj

ŽUPANOVICE — laŭ provisoro raporto partoprenis 60 homoj.

LANČOV I — aliĝis 31 krom la estraro.

LANČOV II — aligis 46 krom la estraro.

Preciza statistiko estos publikigita post finiĝo de ĉiuj kursoj.

Konversacia kurso

Oni rekomendas en konversacia kurso uzi mallongajn, spritajn (pli aŭ malpli) rakontojn, kies enhavon la kursanoj rakontas. En la rakontoj estu precipe la vortoj uzataj en la ordinara vivo.

Kiel oni povas ilin uzi:

Gvidanto de la kurso antaŭe skribu nekonatajn vortojn sur la tabulon (maksimume 8 — 10).

Poste la gvidanto rakontas la enhavon (prefere ne legas), ĉar la rakontadon kursanoj pli atentigas ol legadon. Se iu ne komprenas, li tuj demandas la gvidanton.

Tuj poste rakontas sinsekve la kursanoj, komence pli kaj poste malpli spertaj, sed ne pli ol kvarfoje, ĉar la rakonto enuigus.

La kursestro preparas por ĉiu leciono almenaŭ du tiajn rakontojn. Post kelkaj lecionoj oni povas al la jam duonforgesitaj rakontoj reveni. La metodo estas adaptebla laŭ la medio kaj cirkonstancoj.

Ni petas vin, sendadu al la redakcio similajn rakontojn el via vivo aŭ tiujn, kiujn vi aŭdis kaj legis.

1. Venis inspektoro en lernejon kaj volis ekzameni sciojn de la lernantoj. Estis ĝuste matematiko. La inspektoro diris: "Atentu kaj kalkulu: la klaso estas 12 m longa kaj 6 m (metrojn!) larĝa kaj havas 5 fenestrojn. Ĝia la unua etaĝo estas 22 ŝtupoj, la lernejservisto havas du infanojn. Kaj nun kalkulu mian aĝon. La infanoj ne scias. Post momento levis la manon unu lernanto sidanta malantaŭe: "Mi scias, kia estas via aĝo. Vi estas 44-jara." - "Kiel vi tion elkalkulis?" demandis mirigite la inspektoro. La lernanto respondis: "Ĉe ni estas unu duonstultulo kaj li estas 22-jara."

2. En vagona kupeo sidis kontraŭ si du viroj. Estis tie tro varme, tial sinjoro Adam volis malfermi la fenestron. Li klonodis, ŝvitis, sed ne havis forton por malfermi ĝin. Leviĝis sinjoro Boček kaj elegante malfermis la fenestron kaj sidiĝante diris al la ŝvitinta s-ro Adam: "Oni devas havi tie ĉi!" kaj montris je siaj muskoloj.

La vagonaro veturas plu.

Denove leviĝas sinjoro Adam kaj ŝajnigas kvazaŭ li volus kaj ne povus malsuprentiri la alarm-bremsilon. "Sinjoro Boček denove leviĝas kaj elegante malsuprentiras la bremsilon. La vagonaro haltas, tumulto ĉie, venas la konduktoro kaj legitimigas la sinjoron Boček. Sinjoro Adam diras al li: "Oni devas havi tie ĉi (montras la kapon) kaj ne tie ĉi!" (montras la brakon). J.C.

LINGVA ANĜULETO:

Signifo de akuzativo

"Substantivo estas esence pensata kiel subjekto, ĝi povas esti plue uzata kiel objekto nur helpe de ia gramatika rekonilo, kiu montras tiun transformon kaj precizigos tiun novan funkcion – t.e. de iu morfemo. Distingo inter la du ĉefaj funkcioj en la propozicio estas neevitebla neceso, kaj fakte ĉiuj lingvoj ĝin obeas. Objekt-esprima morfemo ekzistas efektive en ĉiuj lingvoj de la mondo, kaj oni ne vidas, kiel lingvo povus malhavi tian."

Prof. G. Waringhien

En Esperanto tiu "morfemo" estas akuzativo, same kiel en ĉiuj antikvaj lingvoj kaj en modernaj lingvoj slavaj, germana, greka...

Ĝi havas plurajn avantaĝojn antaŭ objektmorfemo

postpozicia (japana lingvo – postmetita vorteto "wo"),

prepozicia (hebrea lingvo) kaj

pozicia (okcident-eŭropaj lingvoj, la ĉina...).

Akuzativo en Esperanto esprimas:

1. rektan objekton – (Mi portas libron. Karlo manĝas ovon.).
2. direkton – (Mi iras en lernejon. Karlo veturas Parizon.).
3. tempon – (Mi venos venontan dimanĉon. – la 2-an de jun.).
4. daŭron – (Mi tie restos 3 tagojn – 8 horojn).
5. pezon, dimension, prezon – (Karlo estas alta 180 centimetrojn. La torto kostas 40 kronojn.).
Atentu ĉiam la ĝustan uzadon!

Enigma kurso?

En ĉiuj lingvoj ekzistas t.n. vortludoj. Ekzemple same sonantaj vortoj aŭ vortgrupoj, vortoj diferencaj inter si nur per unu litero ktp. Sur tiuj ĉi vortludoj bazas multaj enigmoj.

Ĉu havas ian utilon la solvado de tiaj ĉi enigmoj? Oni povas diri, ke jes. Per ili oni lernas novajn vortojn, sinonimojn, kaj oni ekzercas imag- kaj kombin-novon.

Hodiaŭ ni lernos krei kaj solvi unu tian enigmon.

Ĝi estas: **Ŝ A N Ĝ U M O**

Se ni en unu vorto aŭ en vortgrupo ŝanĝas unu literon, ĝi akiras tute alian sencon. Ekzemple: domo-damo, mordi-morti, dezerto-deserto, bori eron - borderon

En la enigma formo tiu ĉi fakto aspektas ekzemple tiel ĉi:

-a— ni per ĝi lavadas nin.

-u— kun la gust' ni manĝas ĝin (Solvo: sopo-supo)

Alia formo: (s - p)

Neparolanta surseĝas mi

super enigmoj,

jen, solvon mi kaptas

kaj tuj ĝin venigi-hastas

al redakcio.

Kiel oni solvu tion ĉi? Substrekitaĵn aŭ aliel signitajn vortojn en la teksto ni anstataŭigu per la sinonimoj aŭ per vortoj kun simila senco. Ambaŭ vortgrupoj estu samsonaj, nur ili diferencu per unu litero, nome per "s" kaj "p". Do jen la solvo:

Neparolanta surseĝas – sendira sidas

venigi hastas – sendi rapidas

En la venonta leciono ni montros kreadon kaj solvon de alia enigmo-speco. Provu nun vi mem krei similajn ŝanĝumojn kaj sendu ilin al la redakcio. Ĉi sube estas por via solvo kelkaj ŝanĝumoj. Ankaŭ ilian solvon sendu, unu libro-premio estas preparita!

1. Kun "d" koron turmentadas,
kun "k" ĉe la bildo gravas.
2. Por la ŝu' materialo .e..
tabuleto el metalo .a..

3. Nokte sur ĉiel' ni vidas -- n --
 kiu donas la arĝentan. -- m --
4. (t - n)
 Ion strangan foje vidis
 mi dum suna tago:
 homo post la bano kuŝis
 ĉe brilanta lago -
 klak - per peza frapo trafis
 propran vangon mano -
 Kial? - Li malbone trafis,
 flugas de li insekto.

Anoncetoj

KORESPONDI DEZIRAS:

1. Voiculescu Stelica, Strada Butesti 3, Raionul Stalin, Bucuresti, RUMANIO. - 22-jara studento.
2. Jang Zun-kun, Ŭn De Len strato, Ĉu Zian parko n-ro 4, Kanton, ĈINIO. - 21-jara studento, deziras korespondi kun esperantistino.
3. H. Scherweit, Freyerstr. 11, Mittweida, GDR.
4. Aldur Järvalt, str. Lahe 1, Kingissepp, Estonio, Estonio, SOVETUNIO - 19-jara studento, pri tekniko, sporto, literat.
7. Jaroslav Badžgon, Kotkova 431, Ostrava-Vítkovice, ĈSR. - 26-j.fervojistino.
 -0-0-0-0-

MEDIKAMENTON "VASOLASTINE" (nederlanda) aŭ VASOLATICA (aŭstria) urĝe bezonas por sia amiko: Radim Kudla, PRAHA 1, Štupartská 9, ĈSR. Rekompenco per varo laŭ deziro.

ESPERANTO FENESTRO AL LA MONDO, faldfolio eldonita de la ArnHEMA Turistoficejo kaj propaganda karteto de la komitato por la internacia ekspozicio de skulptaĵoj en Arnhem estas ricevebla de: V.V.V. Stationsplein 45, Arnhem, Nederlando.

 Karaj legantoj,
 bonvolu pardoni al ni malfruan aperon de tiu ĉi numero. La prokraston kaŭzis la preparlaboroj por niaj SET. Dankon!

NEOLOGISMOJ EN TAGIĜO.

Se ne temas pri gramatikaj eraroj aŭ pri kontraŭfundamentaj formoj, ni principe respektas uzitajn esprimojn de la aŭtoroj, do ankaŭ la neologismojn, kies uzo estas motivigebla.

Kelkaj neologismoj el tiu ĉi numero:

ĉardo - stepní neb venkovská krĉma

hasti - spĉhati (rapidi)

obskura - temný (malluma)

probable – pravděpodobně (verŝajne)

trista - smutný (malĝoja).

Oldfranca kanto

Vojzorgista kanto

/:Sur ŝoseo al Pariz'
vivis juna vojfarist',:/

/:martelis li://:sur voja gruz',:/
martelis li sur voja gruz',
por ke taŭgu voj' por uz'.

/:Or-kaleŝa sinjorin'
ĉe labor' ekvidis lin,:/
/:ho vojzorgist',://:ŝi diras do,:/
ho vojzorgist', ŝi diras do,
peno via pezas tro.

/:Li respondas kun sincer':
Sinjorino, estas ver',:/
/:se povus mi://:laŭ moŝtsinjor':/
sidi ja en kaleŝ' el or'
mi ne penus en labor'.

Tradukis Jiří Kořínek

Vivo non troppo presto



SUR LA ROUTE DE LOU VIERS; SUR LA ROUTE DE LOU VIERS, Y A - VAIT UN CANTONNIER, Y AVAIT UN CANTONNIER ET QUI CASSAIT, DES TAS D'CAILLOUX, ET QUI CASSAIT DES TAS D'CAILLOUX POUR METTRE SUR LE PASSAGE DE ROUES.

Ni dankas al niaj subtenantoj: Kasal, Příbyslav Kčs 3, -, Chrápavý, Ostrava Kčs 3, - Kazda, Karl. Vary 8, - Czáder, Bratislava 8, - Škořupa Jar, Ostrava 7, - Forman Jos, Praha 3, - Zipser Kar. Stonava 1, - Vandlíček, AŠ 2, - Berka Al., Vsetín 4, -- Trojan, Žacléř 3, - Esp. kroužek Netolice 8, - Radonský, Borek 8, - Zvara, Bardejov 3, - Novobilský B., Brno 10, - Staněk St., Praha 8, - Horák Boh., Přerov 3, - Metzger, Plzeň 3, - Kulišek, Plzeň 3, - Drlík Jos., Horní Černošice 8, - Basl Mil Tábor 3, - Drunecký, Ústí n/Lab 8, - Řebíček Jar, Havl. Brod 6, - Petr Jos., Náchod 3, - Jerie Ota, Praha 8, - Kodytek Ant., Nové M., n/Met. 6, - Židek Mojmir -Metylovice 8, - Rozbroj J. Dolní Suchá 3, - Andrštová Jarm., Praha 13,8, - Zapletalová, Pardubice 8, - Vaníček, Netolice 3, - Novosad, Kopřivnice 3, - Vlašánková, Opava 13, - Kobza, Herbortice 8, - Tichota, Karl. Vary 3, - E. Ptok, Mirešice 13, - Rothová Gabr., Poprad 5, - Fejfar, Dymoury 3, - Urbanová, Praha 3, - Kabrda, Pardubice 8, - Srbek, Baštěk 8, - Kaláb, Zbraslav 26, - Rind Jos., Batňovice 8, - Patera, Most 13, - Studený, Vejprty 8, - Dušánek, Chrudim 3, -, Fukala, Dolní Bludovice 6, - Špičák, Pardubice 3, - Sittauer, Třebíč 3, - Křivánek, Písek 24, - Hajzok Jan, Bratislava 8, - Vlčková, Teplice Lázně 8, - Vrkoslav, Praha 4, - Stebel J., Bystřice 10, - Langer, Petřvaldík 1, - Sedláčková, Kladno 3, - Svatoňová, Pardubice 8, - Podhradská, Brno 8, - Beláček Fr., Újezdec 8, - Nýdrle Al., Kladno 3, - Pokorný Ad., Praha 8, - Zrúbková, Frýdlant 1, - Kopecný L., Hlinsko 3, - Kail, Mezouň 10, - Večerek, Ostrava 3, - Staněk J., Praha 1, - Válek, Gottwaldov 1, - Čermák J., Ostrava 8, - Černý J., Litoměřice 5, - Neuwirthová R., Ostrava 3, - Štechr, Pardubice 3, - Matušková M., Frýdek 8, - Kaczorová J., Svit 3, - Skopalík, Šlapanice 3, - Curylová, Ostrava 8, - Ryšavý Jos., Lanškroun 8, - Pytloun Sl., Liberec 3, - Preliáš B., Šumperk 3, - Werner Stan., Těchonín 10, - Jestřáb Jar., Č. Budějovice 8, - Otta Jos., Červená Voda 6, - Rotlová G. Poprad 18, - Vantuch V., Ostrava 3, - Brankytl J., Ostrov n/Ohří 3, - Kalný Jan, Jihlava 5, - Veselý Frant., Ostrava 3, - Karhan Jar., Olomouc 3, - Lička Fr., Ostrava 6, - Vandlíček, AŠ 1, - Habeš Jar., Třebíč 3, - Toufar Jan, Brno 3, - Hošek Rud., Liberec 6, - Satték, Příbor 3, - Mudra F., Horažďovice 3, - Dudek Mil., Pustá Rudná 8, -

ATENTON!!!

Nova adreso:

Kuzník Jaroslav, Opava

U Jaktařské brány 8

ELDONAS: Esperantský odbor Domu osvěty P. Bezruče v Opavě ADMINISTRAS: Jaroslav Kuzník, U Jaktařské brány 8, Opava ILUSTRIS: Karel Škovran, Ing. ark. M. Kalný.
